PENSEO

N-ro 323

sept. / 2018

Monata Beletra Revueto en Esperanto
Honorita de Premio Grabowski, 1994

Fondita en 1990; Enretigita en 1997 la 29-a jaro http://www.elerno.cn/penseo/penlisto.htm

Paulo Silas (Brazilo)




Krima pasinteco

La mozaika trotuaro de kvadrataj ŝtonetoj,
la cement-brikaj elstaraĵoj interne de kiuj
homoj moviĝas etaĝsupren, etaĝmalsupren;
kaj la nigragriza asfalto
sufokas, strangolas la riveron.
Antaŭ cent jaroj, kie nun la dureco tegas,
mola, malvarma tero humidis.
Antaŭ 500 jaroj,
birdoj venis trinki akvon, nesti proksime;
kaj eĉ homoj samspecaj al la nuntempaj,
atingis ĉi tiun lokon por trovi refreŝiĝon.
Ili estis nura ero el pli ampleksa vivsistemo
kaj komprenis sian pozicion.
Ili ne posedis maŝinojn nek potencan
trudforton,
rezulton de obligo de unuhoma detrukapablo.
Nudaj piedoj, nudaj korpoj.
De unu loko al aliaj,
de la aliaj al lokoj pli malproksimaj;
kaj iam revene ĉi tien, al la komencopunkto.
Tamen, kaj antaŭnelonge,
jen ĵus post la frua finkonstruo de la
urboskeleto,
jam en la erao de la tuboj, kiuj peris la
trinkakvon,
la facilan akvon elfluantan el kranoj,
la homoj, tiuj samspecaj kaj parencaj,
ŝveligis la bruston super ekvilibro.
Ilia brua kompreno pri progreso
dampis la teneran vivobruon.
Kiam vi fiksiĝis ĉe la ĉirkaŭaĵoj,
la riveron vi ankoraŭ aprezis.
Sed nun, nuntempuloj, tro malmoderna,
primitiva, dekadenca
iĝis por vi la riverakvoj.
Kaj la pontoj impetas supere super la iame
grava akvofluo.
La busstacidomo cis la akvoj,
la apoteko, la loĝkonstruaĵo, la teknika
lernejo...
Ili ĉiuj situas invade, sur la riverbordo,
la riverborda inundebla areo.
Transe, la superbazaro, la busgaraĝo, la
bezinstacio,
kaj aliaj pluraj loĝkonstruaĵoj
neglektas kaj ne memoras la krimon.
La rivero fluas mute, de orelo al orelo.
En hontige reduktita spaco, la rivero nanas:
necesa malbono, kiu baras plian
konstruaĵo-blokon.
La urbourĝoj ne povas perdi tempon en
kontemplado.
Ĉar ili ne estas pigraj indianoj.
La progreso konsumas ilin.
Kaj la rivero mortas poiome.

25-02-2016

el *Transgeneraciaj kulpoj*

Maria Nazaré Laroca (Brazilo)



Loĝejo

Mi loĝas en eta korpo,
kiu havas taŭgan pezon,
kaj konvenan mezuron
por enŝipiĝi en tempo,
kaj skulpti mian spacon
en ĉi tiu mondo.

Maŝin', pri kiu mi zorgas
cele al ties ĝusta rolo;
lamp', kiun mi lumigas ĝue
por naski la fortunon.

Mi havas etan korpon
el akv' kaj sal', el sang' kaj sun';
liturgia vest', frukt' tera,
kiu senŝeliĝos iam
por la teruteron sterki,
kaj liberigi min al Vivo.

Juiz de Fora, 19/08/2018.

La ĉambro


Mi sidas en blua boato ŝvebanta sub flava ĉielo: jen mia eta dormoĉambro. Ĝi varmigas min, kaj sopiras la aman volupton de la skarlata kovrilo. Tamen espero ne malfermas la fenestron senutile verda.

Du malplenaj seĝoj interparolas silente. Bildoj avide emas eksalti de la muroj kaj disfrakasiĝi sur la malcerteco de la planko. Nur la saĝa spegulo komprenas la solecon de la kapkusenoj.

La horoj min enuigas, kiel muŝoj. Kiu mi estas? Ĉu freneza poeto, kies versojn neniu legas? Ĉu pentristo kun malkomprenita brilo en la okuloj? Kial mi estas ĉi tie? Kien mi iros? Finu vi mian rakonton...

Juiz de Fora, 14/08/2018.

Tiberio Madonna (Italujo)



LA SOLDATETO KAJ LA DANCISTINO

La soldateto el ligno
kun la rigardo fiera
laŭ la ritmo de l' milito
marŝis tra la strato;

tra la strato dancis
laŭ la muziko de l' animo
kun romantika rideto
la dancistino el ŝtofo.

La fadenoj de l' amo
interligis iliajn rigardojn
kaj la paŝoj saltetis
sur la notoj de l' koro.

La ligno faris breĉon
en la delikata ŝtofo
varma kaj morbida
de la dolĉa dancistino.

Sub la uniformo
la fiera soldateto
kaŝis koron
kiu ekdancis kun la ŝia.

Kaj dancadis graciaj
la paŝoj de li kun la paŝoj de ŝi
kiu estis pli kaj pli malpeza
dum ŝia koro flamiĝis.

Sub la vesteto
el velur' flava kaj roza
estis koro el vato
dancanta en la dancistino.

Sub la uniformo
la fiera soldateto
kaŝis koron
lignan, duran kaj pintan.

En la brakum' la pinto de l' koro
senmova el ligno
pikis ŝin en la vato
konfuzita en la doloro.

La soldateto el ligno
kun la rigardo fiera
ridetis frostan rideton
dum li foriĝis de ŝi.

Kaj li marŝis tra la strato
forportante kun si
la vaton elŝiritan al ŝi
kiu dronis en la trompo.



Christian Cimpa (Aŭstrio)



La paca lingvo

Ho, mi estas parolanto
de la milda Esperanto,
tiu sankta il‘ de l‘ paco!
For jam ĉiu ajn minaco,
ke malamo min altuŝus!
Ŝajnas, en la lingvo kuŝus
paco pura, paco bela,
dia lum‘ eterne hela!
Kion tamen mi ne scias:
Kial tio jam funkcias
eĉ, se oni ĝin nur lernas?
Eble, ĉar ide‘ internas?
Nu, la kaŭzoj ŝajnas mitaj!
Ĉu literoj ĉapelitaj
aŭ ĉu kulpas la vokaloj –
ĉu la lumaj numeraloj?
Estas ĉu la gramatiko
la balzamo por la psiko?
Eble estas kor-mielo
ja la bela vorttabelo?
Vere pri miraklo temas,
kiun mi defendi emas
sen rezervo kaj sen brido
kontraŭ la damnita Ido
kaj la fuŝa lingvo-truko
de la merda Volapuko!
Mi surbuŝe bati volas
ĉiun, kiu ĝin parolas!
Ĉiu, kiu tion faras,
idiote ja eraras!
Gvidas – diras mi sen laco –
Esperanto nur al paco!

Vejdo (Ĉinujo)



Malsaĝa Avo formovis montojn

ĉina antikva fablo

I.

Malsaĝa Avo loĝis izole montpiede,
la voj’ zigzagis inter alt-montoj tre apikaj.
Familianoj ĉiam eksentis sin panikaj,
se ili volis iri eksteren senrimede.

Vojaĝ’ konsumis longan tempdaŭron vere tede
kaj ilin suferigis la iroj lunatikaj.
Survoje veproj frapis ilin per dornoj pikaj,
terfendoj kaj rokegoj minacis ja obsede.

Formovi l’ Av’ decidis du montojn kiuj ĝenis
per ĉirkaŭiroj ilin, starantajn ĉe l’ kabano.
Persvadi la domanojn en hejmo li ja penis.

Gefiloj liaj lian volegon jen komprenis,
promesis doni fortojn por lia granda plano
kaj la rimedojn eblajn preparajn tuj alprenis.

II.

Sekvtage li kondukis gefilojn al la monto
kaj ekis foslaboron pioĉe kun fervoro.
El ili iuj fosis, aliaj al la foro
transportis ŝtonojn ĉare, ŝvitante kun volonto.

Nenia grumbl’ okazis en familia rondo,
neniu pigris iel kaj plendis pri laboro.
Post kelkaj jaroj la montoj en sungloro
variis neniome kaj restis sur termondo.

Sed ili ne rezignis, ankoraŭ fosis plie,

laciĝon, malfacilojn ignoris tre kuraĝe,
kun cel' formovi montojn ankoraŭ energie.

La olda Av' fortstreĉis, kvankam iom
malsaĝe,
modelon li starigis por idoj mens-racie,
elspezis forton, tempon kaj riĉon sendomaĝe.



III.

Vidinte tion klare, maljuna Saĝa Avo
demandis al li: "Kial vi tion ja infane
fifaras? De antikve la montoj staras sane,
kaj povas ne moviĝi pro via ega bravo."

Replikis Av' Malsaĝa defende ja kun pravo:
"Laboron tiun ni ne faradas tute vane.
Ne diru sensencaĵon tiome vi ĉikane.
Min pikas via diro maljusta kiel glavo.

Se mi ne povos fini, genepoj miaj vere
daŭrigos l' entreprenon senĉese kontinue,
sukcesos la du montojn formovi sinofere."

Kortuŝis Ĉielreĝon agado lia skue,
ordonis Li formovi la montojn jen eltere.
Pro tio Av' Malsaĝa dankegas plene ĝue.

Wally du Temple (Kanado)



Panja Poeto Foje Diris

El mia koro foje poemis
Fingretoj, oreletoj paraj,
Akuŝintencoj miaj karaj.
Ĉu poemo naskita antaŭtempa?
Nudvundeblas ĝi sub neona zum'
En kovilo sub elektra lum'?
Muro baras min de mia bebo –
De vivanta mia haŭtfalduleto.
Nun manlevas ĝin la kuracist'.
Ĉu kritikist'?
Vangon premas mi en la persist'
Al vitra mur' kiu baras min.
Ĉu deziras mi plue moldi ĝin?
Ne, ĝi vivas kaj poemas.

RESPONDO AL 'REE PRI PACO'

de Jiri Korinek 1986 en "Poemaro por Paco" UEA

Pri tio ja emas mi temi
ke ni jes emas emi
Pri l' paco jes poemi,
Jes ja mi certon havas,
ke paco seme kreskas
Ĉar akvo igi emas
estaĵojn pli komplikajn
vegetalajn, animalajn
sociojn interdependajn.
Ne stulto kaj frenezo
diktas klimata la admono.
Amebo, kverko, homo
Ĉio estiĝis el la akvo
lantante la amo ankaŭ
Atendas akuŝon baldaŭ
post vi, post ni —
Triumfos post la agoni'
homcerba civilizaci'!

2016

Lily (Ĉinujo)

Sub lunlumo

Frida brizo blovas karese milde
tra arbar' sub luno plenluma brile,
paro da amantoj intime kveras,
kisas trankvile.

Sur herbejo ili dorskuŝas pace,
ĝuas l' amon dolĉan pasie, flame.
Palpas li ŝiajn elstarajn mamojn
sorĉajn permane.

Flaras li odoron parfuman snufe,
en ekstaz' ebrie forgesas sin mem.
Ĝi el korpo ŝia pufeta ravas
lin per kortrem'.

Turnas sian kapon li ŝmace kisas
ŝian vangon kaj li ŝin tiras flirte
al la brusto sia vilplena nuda
kvazaŭ bonvirte.

Ŝi kokete, milde forpuŝas buŝon
lian kaj sin tenas diskreta vere,
pro allogo de voluptemo cedas
ŝi finfine al nedeca konduto lia
agi libere.

Lia brakumringo sufokas preskaŭ
ŝin je spiro kaj li incitas vorte
ŝian tiklan koron, ŝi nestas sine
ja pli komforte.

Ekas ama ludo fervore arde,
kisoj, lipmordetoj, tordiĝ' avida,
langoŝmacoj, palpoj, brakumoj karnaj—
ĝuo senbrida!

Nokto profundiĝas. Ĉirpad' de griloj,
bru' de akvaj plaŭdoj, susur' de vento
supersonas ĝemojn, ĝojkriojn tute
en ĉi momento.



El Ĉina Antikva Poezio

Su Shi (1037 - 1101)



Printempa nokto

Moment' de nokt' printempa valoras kiel oro:
Lunombro svagas, puran aromon spiras floro,
Alŝvebas belaj kant' kaj muzik' de
bambu-fluto,
En korto regas nigro, senmovas ĉi pendolo.

Bankedo kun la imperiestro en la Lanterna Festo

Sporadaj steloj, pala la lun' ĉe Jianzhang[1]
glimas,
L' incensofumon blov' elĉiela nun animas.
Ministroj staras grue rigide en reĝ-halo[2],
La reĝ' sur trono ruĝe nubeska ja sublimas.

1. Jianzhang: nomo de imperiestra palaco en la dinastio Song (960 - 1279).

2. Reĝ-halo: kies nomo estas Tongming kaj kiu situas en la palaco Jianzhang.

Yang Juyuan (755 - 832)



Frua printempo oriente de la urbo

Poetoj amas vidojn de l' nova primaver':
Salikoj ĵus junverdas ĉe sia ĝermaper'.
Se en ĝardeno reĝa sterniĝos buntaj floroj,
Eliros homoj ĉie por bel' jam en prosper'.

Wang Anshi (1021 - 1086)

Printempa nokto

Klepsidro malpleniĝas, en incensujo ĉesas
Fumado, dume vento la frida min agresas.
Maldormon trudas spiro printempa, en
lunlumo
Florombroj balustradon senbrue nun karesas.

La novjara tago

En petard-krakaj sonoj forsvenas pasint-jaro,
En printemp-varm' oni drinkas sen avaro.
Mil kaj mil familiojn karesas brila suno,
Fetiĉon novan gluas oni al pordklap-paro.

Zhang Shi (1133 - 1180)

Improvizita je la Printempokomenco

Ĉe jarturn' ekraras frostaj prujno kaj glacio,
Herboj, arboj ekprintempon konas kun
konscio,
En okuloj plenas viva viglo de naturo,
Vento blovas la riveron en verda vario.

Chao Yuezhi (1059 - 1129)

Pentraĵo pri pilkoludo

Palacaj pordoj unu ovriĝas post alia:
Reĝo[1], ludinte pilkon[2], revenas jam ebria.
Oldiĝas Jiulin[3]g, mortis Han Xiu[4]. Plu donos
al li
Admonojn kaj konsilojn neniu pens-racia.

1. Reĝo: nome la imperiestro Xuanzong de Tang-dinastio (618 – 907); inter la popolo, poste, oni nomas lin ankaŭ Sanlang.

2. Pilko: speco de piedpilko en la antikveco en Ĉinio. Ĝi estis fermita per streĉitaj folioj el ledo kaj plene ŝtopita per rizbrano.

3. Jiuling: nome Zhang Jiuling. Unu, honesta kaj kompetenta, el la ĉefministroj dum la regado de la imperiestroj Xuanzong.

4. Han Xiu: alia ĉefministro kvalite simila kiel Jiuling dumtempe.

Elĉinigis

Minosun (Ĉinujo)

&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&&

Ivaniĉka Maĝarova (Bulgario)

Tie, ĉe l' fontan',
rozoj aromelspiras.
Revu' de Chanel.

❄

Sunleporeto
kaŝrigardas la ĉambron.
Infanrememor'.

❄

La ruĝa vino
malvarmiĝas en glasoj.
Sojl' senhomiĝas.

❄

La sapveziko
pentradas la nebulojn.
Suna rideto.

Liu Aofu

PISI KUNE KUN ESTRO

en latrino
estas nur du pelvoj por urino
dum mi pisis

mia estr' englisis
staris apud mi
kaj ekpisis jen sen kri'
muta en silento
pensis mi en la momento
ke mi devas kelkajn vortojn doni
diris, do, mi:
via estra moŝt', ho, pisado via
ja pli bonas
ol la mia

Elĉinigis **Mandio (Ĉinujo)**

Ilir Zhiti



Senkapigo

Spektante makabrecan scenon kie soldato de ISIS senkapigas, sen ia ajn konsciriproĉo, malfeliĉulon, mi verkis la sekvantajn versojn.

Senkapigi homon
tutsimpla kaj facila estas
kun la ruliĝanta kapon
sangumita lastfoje
ruliĝas ankaŭ mem Planedo
je sangoplena formo
de kruele hakita kapo.

En momenteto kiam homo senkapiĝas
homo kiel mi kaj vi
la oceanaj ondoj inundi endas
ĉiun teran parton
je ululado pro doloroj.

Kun la hakita kapo
jam mortis ankaŭ Universo ene de li
mortis ja vivomemoro, perdiĝis
ĉiuj multaj vizaĝoj
konataj dum lia vivo,

plue ĉiuj lernitaj scioj
kaj tiuj hereditaj dum miljaroj
perdiĝis amoj, revoj, deziroj
kontinueco fontanta ekde pli fora pratempo
sed nun ĉiuj interrompitaj...

Li estis vera homo kiel ĉiuj
kaj ceteruloj estis ja similaj al li
Sen vivo de individuoj
eĉ Universo perdas sian signifon

Ili estas ja ĝia memoro
Kiam homo senkapiĝas
tio tutsamas kvazaŭ mortiĝis
ĉiuj kiuj bonŝancis naskiĝi en ĉi tiu Mondo.

Por kiu ajn ido de detruo
Ĉi ago tutsimplas kaj facilas
Eble ankaŭ Dio mem
sentas sin malkvieta
ke sia "ĉefverko"
kruele sin mem
estas detruante.

Tirana, 17.10.2017

EGOISMO

Pli multe ni volas
amojn kiuj neniam realiĝis
urbon kie neniam ni povis iri
librojn kaj poeziojn kiujn ni ne komprenis komplete
tiuj plurestis pli longe en nia memoro,

ofte ni amas pli multe diktatoron
kiu turnas nian vivon al penado
kaj justulojn kaj idealistojn
ni vidas dubeme en iliaj celoj

Ni adoras tiujn kiuj nian amikecon ne akceptas
ofte ni virinon neglektas
kiu fidele restas apud ni
ni frenezas pro sciencoj kaj scioj
kiujn neniam ni asimilis
enamiĝinte ni estas freneze

al nia egoismo nekorektebla

Tirana, 31.10.2017

Esperantigis



Bardhyl Selimi (Albanio)

Zhuangzi (369-286 a.K)



Zhuangzi

ĈAPITRO DEKKVARA

La movoj de la ĉielo

§14-06

Konfuceo iris vidi Laŭzi kaj parolis al tiu pri la humaneco kaj la justeco.

“Kiam vi ventumas grenon kaj grajnoŝeleto falas en la okulon,” diris Laŭzi, “tiam vi havas la impreson, kvazaŭ la ĉielo, la tero kaj la kvar direktoj de la spaco ŝanĝas sian lokon. Kiam vi estas pikita de moskito aŭ tabano, tiam vi apenaŭ povas endormiĝi la tutan nokton. Kiam vi estas konfuzita de la humaneco kaj la justeco, tiam vi estas ĵetita en la plej grandan malordon. Se vi volas, ke la tuta mondo konservu siajn originajn purecon kaj simplecon, vi devas agi tiel libere, kiel la vento, alkroĉiĝante al via denaska naturo kaj starante ekster la mondaj aferoj. Kial do vi tiel energie rekomendas la humanecon kaj la justecon, kvazaŭ vi tamburus por retrovi vian filon forkurintan?

“La cigno ne sin banas ĉiun tagon kaj tamen restas ĉiam blanka; la korvo ne sin nigrigas ĉiun tagon kaj tamen restas ĉiam nigra. Kiel la blanko kaj la nigro estas koloroj propraj kaj sekve ne estas diskuteblaj, tiel la eksteraj famo kaj laŭdo estas aĵoj nepropraj kaj sekve ne estas troigeblaj.

“Kiam la fontoj estas sekiĝintaj, la fiŝoj amase restas sur la tero, humidigante unu alian per sia spirado kaj malseketigante unu alian per sia salivo. Sed estus multe pli bone por ili vivi en la riveroj kaj lagoj, sin forgesante reciproke.

§14-07

Post tiu ĉi vizito al Laŭzi, Konfuceo restis sen parolo dum tri tagoj. Unu el liaj disĉiploj lin demandis:

“Majstro, kiam vi vizitis Laŭzi, kian admonon vi donis al li?”

“Tiam mi ja vidis la drakon en li!” diris Konfuceo. “La drako alprenas fizikan formon tiam, kiam ĝi sin kuntiras; ĝi fariĝas buntkolora desegnaĵo tiam, kiam ĝi sin etendas. Ĝi rajdas sur nuboj kaj nutras sin per la vitala energio de la jino kaj la jango. Gapante, kiel mi povus diri ion admonan al li?”

“Ĉu do vere ekzistas homo,” diris Zigong. “kiu restas tiel senmove, kiel kadavro, moviĝas tiel rapide, kiel drako, parolas tiel laŭte, kiel tondro, kaj tenas sin tiel silente, kiel profunda abismo, kaj kies movoj estas kiel tiuj de la ĉielo kaj la tero? Ĉu ankaŭ mi povus lin viziti?” Li do iris vidi Laŭzi kun rekomendo de Konfuceo.

Laŭzi senzorge sidis en sia salono tiam, kiam li akceptis Zigong kaj diris mallaŭte:

“Mi estas maljuna,” diris Laŭzi. “Kion vi havas por min admoni?”

“La tri imperiestroj kaj kvin reĝoj akiris al si egale grandan famon malgraŭ ke la manieroj de ilia regado de la mondo diferencis inter si. Kial do vi sola rifuzas konsideri ilin kiel saĝulojn?”

“Alproksimiĝu, junulo!” diris Laŭzi. “Kial do vi opinias, ke la manieroj de ilia

regado diferencis inter si?”

“La reĝo Yao transdonis sian tronon al la reĝo Shun, kaj la reĝo Shun transdonis sian tronon al la reĝo Yu. La reĝo Yu penis bridi la inundon kaj la reĝoTang uzis militajn fortojn kaj renversis la regadon de la reĝo Jie. La reĝo Wen estis obeema al la tirano Zhou kaj ne kuraĝis kontraŭstari al li, kaj la reĝo Wu kontraŭstaris al la reĝo Zhou kaj sendis armeon kontraŭ li. Jen kial mi diris, ke la manieroj de ilia regado diferencis inter si.”

“Ankoraŭ iom pliproksimiĝu, junulo!” diris Laŭzi. “Mi diros al vi, kiel la tri imperiestroj kaj la kvin reĝoj regis super la mondo. Kiam la Flava Imperiestro regis super la mondo, li sukcesis revenigi la popolon al sia denaska naturo. Se iu ne ploris ĉe la morto de sia patro aŭ patrino, oni lin ne riproĉis. Kiam la reĝo regis super la mondo, li instigis sian popolon al la amo al siaj gepatroj. Se ies patro aŭ patrino mortis kaj la parencoj observis malsaman formon de funebrado, tio provokis nenian kritikon. Kiam la reĝo Shun regis super la mondo, li kuraĝigis la popolon al konkurado. Tiam infanetoj naskiĝis post dekmonata gravedo kaj iuj el ili jam povis ekparoli en la aĝo de kvin monatoj kaj povis rekoni homojn antaŭ ol scii rideti. Rezulte de tio, homoj komencis morti junaj. Kiam la reĝo Yu regis super la mondo, la popolo ruziĝis kaj ekhavis malamon en la koro, sekve la buĉado fariĝis pravigebla — mortigi ŝteliston aŭ rabiston ne estis konsiderata kiel hom-mortigo. Kun diversaj pretekstoj homoj kolektiĝis kaj batalis inter si por la trono. Rezulte de tio, la popolo de la tuta mondo estis ĵetita en grandan panikon, kaj pro tio aperis konfuceismo kaj moismo. Komence en iliaj doktrinoj ŝajne estis io pravigebla, sed, nun ke la mondo degeneris ĝis tia grado, kion do vi havas por diri pri tio?

“Mi diros al vi, kiel la tri imperiestroj kaj la kvin reĝoj regis super la mondo. Kvankam oni diras, ke ili faris regadon, sed fakte ili alportis grandan malordon al la mondo. Pro ilia saĝeco la brilo de la suno kaj la luno supre estis malheligata, la energio de la montoj kaj riveroj malsupre estis konsumata, kaj la alternado de la kvar sezonoj inter la ĉielo kaj la tero estis malordigata. Pro ilia saĝeco, kiu estis pli venena ol la vosto de skorpio, eĉ la plej malgrandaj insektoj ne povis pace vivi konforme al sia vera naturo kaj al siaj originaj inklinoj. Anstataŭ honti, tiuj suverenoj eĉ konsideris sin saĝuloj. Kiel senhontaj ili estis!”

Tre konfuzita, Zigong staris en granda ĝenateco.

§14-08

Konfuceo diris al Laŭzi:

“Longatempe mi kompilis la ses klasikaĵojn — *Libron de Poezio, Libron de Historiaj Dokumentoj, Libron de Ritoj, Libron de Muziko, Libron de Ŝanĝiĝoj* kaj *Analojn de Printempo kaj Aŭtuno*, kaj mi konsideras min kiel perfektan konanton de ili, sed, kiam mi penis persvadi la sepdek du princojn diskutante kun ili pri la manieroj de la regado fare de la antikvaj reĝoj kaj eksplikante al ili la brilajn atingojn de la dukoj Zhou kaj Shao, neniu el ili akceptis miajn proponojn. Kiel malfacile estis! Ĉu la malfacilo kuŝas en la konvinkado de la homoj aŭ en la eksplikado de la Taŭo?”

“Kiel bonŝanca vi estas!” diris Laŭzi. “Feliĉe vi ne renkontis princon, kiu regus en bona ordo. La ses klasikaĵoj estas piedsignoj lasitaj de la antikvaj suverenoj. Ili tute ne eksplikas la devenon de tiuj piedsignoj. Tio, kion vi ĵus diris, estas kiel piedsignoj. La piedsignoj estas lasitaj de ŝuoj, sed kiel oni povus diri, ke la piedsignoj estas la ŝuoj mem? Paro da blankaj ardeoj fikse rigardas unu la alian per senmovaj okuloj kaj tiel gravediĝo povas okazi. Unu virseksa insekto ĉirpas alvente kaj unu inseksa respondas al li subvente kaj same okazas gravediĝo. La

hermafrodito estas samtempe vir- kaj virinseksa kaj povas mem gravediĝi. La denaska naturo ne povas esti modifita, nek la destino povas esti ŝanĝita. La tempo ne povas esti haltigita, nek la Taŭo povas esti obstrukcita. Se la Taŭo estas kun vi, ĉio estas ebla por vi; se la Taŭo ne estas kun vi, nenio estas ebla por vi."

Konfuceo sin izolis hejme dum tri monatoj. Poste li ree vizitis Laŭzi kaj diris:

"Mi nun ekkomprenis! La birdoj kovas; la fiŝoj frajas; la vespo generas per transformiĝo; kiam pli juna bebo naskiĝas, la pli aĝa frato ploras pro tio, ke li perdos favoron. Tre longatempe mi ne sekvas la naturan evoluon de la estaĵoj. En tia okazo, kiel mi povus helpi la aliajn?"

"Bonege! Vi jam atingis la Taŭon."


Elĉinigis



Wang Chongfang (Ĉinujo)

Ĉineske

Jadranka Miric (Serbujo)



Post la pluvaj tagoj

—laŭ ĉinesko sopir-al-sudo*

Finfine
suno honte tra
nuboj aperis.Freŝa
aero preskaŭ vintra.
Tero jam putra.

Gajiĝis
birdet' flugante
de unu al alia
branĉet' , milde pepante.
Ĥoruse. Lante.

Aŭdiĝis
jam, grila ĉirpad'.
Dum senlacaj formikoj
scias nur por laborad'
sen ĝoja parad'.

Kun bela
veter' sekiĝos
moliĝa tero ke tuj
herbejo ekfloriĝos.
Ĉiel' bluiĝos.

Varmiĝas
vangoj de suna
tuŝo. Brue infanoj
pilkon ludas ĝis luna
aper'. Helluma.

Vivo-energioj

—laŭ ĉinesko sopir-al-sudo*

Junulo
venas kun floroj.
Florbukedo el rozoj.
Ruĝaj por amesprimoj.
Am' sen ĵaluzoj ,

ne eblas.
Amtenero en bluec'.
Fiero kaj fidelec'
ĉu se adorec'.

Sen amo
vivo ne eblas
sur Tero nek en aer'.
Viola ja, allogas.
Amon influas.

Koloroj

de la vivo , ve
ne decidas ĉu blanko —
nigra estu viv' sed de
fi-faroj , ĉu ne !

Por vivo
kaj amo kaj sun'
ne sufiĉas. Aero
por spiri nepras. Eĉ Lun'
nokte. Tage Sun'.

Eto (Ĉinujo)

Somermeza pluvo

—laŭ ĉinesko Sopir-al-sudo*
Antaŭ pluv'
griza nub-arme'
peze premas minace
super aŭt-plena ŝose'
kvazaŭ ĝis pere'.

Jen tondras.
Ekas pluvtorent'
bati la teron forte
jen en furioza vent'
laŭ sia kontent'.

Inundas
akvo inside
en stratojn kaj rizkampojn
kvazaŭ kuranta rapide
ĉeval' senbride.

Sub premo
de venta blovo
falas arboj sur teron
eĉ sen rezista povo
pro forta ŝovo.

Surstrate
homoj evite
sin ŝirmas sub tegmentoj
aŭ marŝas senhezite,
al pluvo spite.

Abrupte
aperas la sun'
tuj post ĉes' de pluvego.
Ĉio en varma brakum'
nestas ree nun.

**Sopir-al-sudo (ĉine: Yijiangnan): ĉina fiksforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).*

Eto (Ĉinujo)

Amsento sub lun'

—laŭ ĉinesko Dekses-Silabo*
Lun'
alte pendas super dun'
mi kaj ŝi
promenadas nun.

Ni
kveras jen kun emoci',
brakumas
vere en pasi'.

Per
dolĉaj vortoj en tener'
parolas
mi ja kun sincer'.

Al
ŝi konfidas sen vual'
mi ĉion
kun tuta lojal'.

Kor'
mia al ŝi kun favor'
ja klaras
kiel luna glor'.

**Deskses-Silabo: ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj, laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)*

Julian Modest (Bulgario)

LA FRENEZULO KAJ LA PACO

La loĝkvartalo estis ĉe la rando de la urbo. Ĝi aperis preskaŭ nerimarkeble antaŭ du jaroj. Oni nomis ĝin "Revo", tamen la vorto "kvartalo" ne estis tre preciza, ĉar ĝi konsistis nur je kvin altaj loĝdomoj. Proksime al la domoj estis parko, same nova, kun bedoj, floroj, arbetoj, maldikaj kiel infanaj brakoj, etenditaj al la ĉielo. En la mezo de la parko estis infanludejo kun glitiloj kaj luliloj.

En la novaj domoj loĝis junaj familioj kaj nun, en la komenco de la somero, en la parko estis multe da patrinoj kaj infanoj. La infanoj lulis sin, glitiĝis, kuris inter la benkoj. La patrinoj sidis kaj atentis, ke ili ne falu kaj ne rompu brakon aŭ kruron, aŭ ne kverelu unu kun alia.

Subite en la mezo de la infanludejo aperis stranga viro. Li estis mezaĝa, iom neglekte vestita kun griza pantalono kaj flava ĉemizo. Liaj longaj haroj libere falis sur liajn ŝultrojn. Se oni rigardis lin dorse, certe opinius, ke estas virino, ĉar li tre maldikis.

La viro staris senmova sur la infanludejo, strabante la ĉielon kvazaŭ serĉis ion tre gravan tie. La patrinoj alrigardis lin mire, sed post sekundoj ŝajnigis, ke ne rimarkas lin. La viro staris kaj ne moviĝis. Kaj kiam la patrinoj jam opiniis, ke la strangulo restos tie senmova kaj silenta, li komencis terure krii:

–Bomboj! Bomboj! Milito! Milito!

Estiĝis tumulto. La patrinoj eksaltis de la benkoj, ĉirkaŭbrakis la infanojn kaj timigitaj forkuris malproksimen de la infanludejo, kie restis nur la strangulo kriante:

–Bomboj! Bomboj! Milito! Milito!

Unu el la patrinoj kun sia eta ido alkuris al malproksima benko, sur kiu sidis maljuna viro.

–Ĉu vi timiĝis? – demandis li ŝin.

–Jes – respondis la patrino. – Mi ne scias kial ĉiuj frenezuloj promenas libere en la urbo kaj ne estas en la malsanulejoj. Nenie oni povas esti trankvila. Ja, ĉi tie ludas infanoj. Li timigis ilin kaj nokte ili sonĝos koŝmarojn.

–Li ne estas danĝera – trankviligis ŝin la maljunulo. – Mi konas lin. Li nomiĝas Andreo. Antaŭe li estis bona, saĝa viro, inĝeniero. Verŝajne de antaŭnelonge vi loĝas ĉi tie?

–Jes, jam de du monatoj.

–Tial vi ne scias, ke antaŭ tri jaroj ĝuste ĉi tie estis fabriko pri infanteriaj minoj – klarigis la maljunulo. – En tiu ĉi fabriko laboris Andreo. Tamen okazis eksplodo. Multaj laboristoj pereis. Neniu scias kia estis la kialo. Verŝajne iu laboristo eraris ion aŭ malatente agis. Andreo ne pereis, sed freneziĝis. Tiu ĉi loko memorigas lin pri la eksplodo kaj tial li ofte venas ĉi tien kaj kriegas.

La frenezulo denove komencis krii:

–Bomboj! Bomboj! Milito! Milito!

Tamen, kiam li vidis, ke estas sola sur la infanludejo, trankviliĝis kaj iom mallaŭte li ekkantis:

–Paco! Estiĝis paco! Silento kaj trankvilo! Mi alportis la pacon sur la tuta tero.

–Jes – diris la maljunulo. – Andreo pravas. Nun estas paco.

Poste la viro alrigardis la patrinon kun knabineto kaj aldonis:

–Oni ne devas timi la frenezulon, sed la veran milton. Via filineto vivu en paco. La milito estu nur en la imago de la frenezulo.

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_

Eldonas Redakcio de ***Penseo***
Ĉefredaktoro: s-ro Yida Wei (Vejdo)
Adreso: No.-3-2 de la 5-a etaĝdomo
de No. 19, St. Wujiang, Jiangbei-Distrikto,
Chongqing, 400023, Ĉinio
Retadreso: vejdo@163.com
Por legi pasintajn numerojn de Penseo, vin turnu al www.elerno.cn/penlisto.htm

_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_◊_